

Unesko kaj China Report Press plu eldonos Unesko-revuon en Esperanto



Ian Denison, estro de la fako de Unesko pri eldonado kaj markado, anoncas la novan interkonsenton en Pekino la 7-an de januaro. [Foto perita al China Daily]

La 7-an de januaro 2020 en la domo de Ĉina Internacia Eldona Grupo (ĈIEG) okazis ceremonio de subskribado pri kuneldonado de la Esperanta versio de Unesko-Kuriero. La ceremonion ĉeestis gvidantoj kaj reprezentantoj de ĈIEG, El Popola Ĉinio kaj Unesko-Kuriero.

Organizita de la Presejo de China Report kaj la Ĉina Esperanto-Asocio, la ceremonio markis la partnerecon inter Unesko kaj la Eldonejo de China Report, sub ĈIEG, por traduki kaj eldoni la Esperanto-version de la Kuriero de Unesko, la ĉefa revuo de Unesko.

La revuo estas eldonata kiel platformo de komunikado inter malsamaj civilizoj. Ĝi rekomencis aperon en la jaro 2017 kun subteno de la ĉina registaro kaj nun aperas en 11 lingvoj.

Ĉina Esperanto-Asocio estas aliĝinta landa organizo de Universala Esperanto-Asocio. Depost sia reviviĝo en 2017, la revuo estis eldonata de Unesko kunlabore kun UEA. La nova interkonsento igas la Esperanto-eldonon oficiala kaj garantias ĝian estontan aperon. Laŭ Du Zhanyuan, prezidanto de ĈIEG, "La kunlaboro inter ĈIEG kaj Unesko estas bona komenco kaj bona okazo. Estontece, la komunikado sur tiu ĉi platformo ebligas al ambaŭ flankoj kunlaboron en pliaj terenoj."

"Aperigo de la Esperanto-versio de la Kuriero de Unesko kongruas kun la celo de Unesko pri antaŭenigo de kultura diverseco kaj la utiligo de Esperanto," deklaris Ian Denison, estro de la eldonada kaj markada fako de Unesko.

(Wang Ru por China Daily, kaj aliaj fontoj)

Konferenco de NROj alvokas plifortigon de UN okaze de la 75-a jubileo

La Sistema de Unuiĝintaj Nacioj devas esti plifortigita, pli bone strukturita, pli bone uzata de registaroj, kaj konsiderinde pli bone financata, laŭ deklaro pri la estonteco de Unuiĝintaj Nacioj publikigita la 12-an de oktobro de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (CoNGO). La deklaro nun akiras subskribojn de neregistaraj organizoj (NROj) tra la tuta mondo.

La deklaro "salutas la atingojn de Unuiĝintaj Nacioj en daŭrigo de paco kaj sekureco, apogo de homaj rajtoj, kaj antaŭenigo de daŭripova evoluigo" sed samtempe atentigas pri multnombraj mankoj en tutmonda subteno de UN kaj en ĝia agokapablo. "Okaze de la 75-a Jubileo," la Deklaracio asertas, "ni devas transiri el klimato de naciismo, konflikto kaj maljusto al kulturo de multflankismo, paco kaj sekureco, por la bono de la tuta homaro."

Prezentante la deklaron al kunveno de membroj de CoNGO en Novjorko en decembro, Humphrey Tonkin, estrarano de CoNGO kiel reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio, atentigis, ke Unuiĝintaj Nacioj, "spite ĉiujn obstaklojn, ŝirmis nin el mondmilito tra 75 jaroj." Laŭdante tiujn kiuj kontribuis al tiu ĉi "elstara atingo," li tamen notis, ke lokaj kaj regionaj ekflamoj daŭras, eĉ plimultiĝas: "Kun sia nulo-suma mentaleco kaj sia deziro dividi la landojn por tenadi potencon, la politikaj elitoj multe tro ofte turnas la dorson al internacia kunlaboro, hejtante naciismajn sentojn, disvastigante timon de alilandanoj, kaj abandonante internaciajn interkonsentojn."

"Ni ĉiuj decidu paroli pli malmulte kaj aŭskulti pli multe," Tonkin deklaris, eĥante la admonon de la Ĝenerala Sekretario de UN António Guterres, ke "Ni devas unuiĝi, ne nur por paroli sed ankaŭ por aŭskulti."

La Deklaracio de CoNGO alvokas al la UN-Sistemo, ke ĝi pli multe utiligu la kompetentecon kaj spertojn de NROj kaj la pli vasta Civila Socio kiel esencaj partneroj en certigado de paca kaj justa mondo konstruita sur plenumo de la Celoj pri Daŭripova Evoluigo.

La deklaro estas legebla ĉe la retejo de CoNGO www.ngocongo.org en la angla, franca kaj hispana. Baldaŭ aldoniĝos Esperanto-

traduko.

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de Homrajta Tago, 10 decembro, kaj Zamenhof-Tago, 15 decembro, 2019

Ĉiujare, la 10-an de decembro, ni festas la Tagon de Homaj Rajtoj. Temas pri la dato en la jaro 1948 kiam la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis akceptita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj.

Fundamenta al la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj enskribita en ties Ĉartono estas respekto de homaj rajtoj kaj la rajto de ĉiuj homoj vivi siajn vivojn en libereco kaj digno. Artikolo 1.3 de la Ĉarto aludas al celado “antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj, sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio.”

DECEMBER 10 INTERNATIONAL HUMAN RIGHTS DAY



Homrajta Tago estas aparte grava al nia Asocio, Universala Esperanto-Asocio, pro du kialoj.

Unue, ĝi memorigas nin, ke, jam en la jaro 1947, la nova statuto de nia Asocio enhavis deklaron, ke respekto de homaj rajtoj estas necesa kondiĉo por nia laboro kiel neregistara organizaĵo. Ankoraŭ hodiaŭ ĝi restas esenca elemento en nia laboro.

Due, Homrajta Tago okazas kvin tagojn antaŭ Zamenhof-Tago, la 15-a de decembro, la tago en kiu la fondinto de la Internacia Lingvo Esperanto, L. L. Zamenhof, naskiĝis en 1859. Niaj lokaj kaj naciaj kunlaborantoj ofte festas la Tagon de Homaj Rajtoj kaj Zamenhof-Tagon samtempe, emfazante la ligan inter la streboj de Zamenhof favore al internacia interkompreniĝo, unuflanke, kaj la rekonado de universalaj homaj rajtoj, aliflanke.

La alvoko de la Ĉarto de UN pri “respekto al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio” memorigas nin, ke netolero de lingvaj diferencoj ofte formas la radikojn de ksenofobio kaj povas provoki perfortajn konfliktojn. Pro tio nia Asocio alvokas al respekto de ĉies lingvoj, kaj antaŭenigas la Internacian Lingvon Esperanto kiel ponton trans lingvaj diferencoj.

Okaze de Homrajta Tago 2019, ni alvokas al respekto por lingva malsameco, por ĉies rajto uzi la propran lingvon, kaj por klopodoj trovi pontojn inter lingvoj, kiuj favoras egalecon, toleremon, kaj pacon.

Simpozio pri Lingva Diverseco kaj Daŭripova Evoluigo, honore al la 75-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj, okazos en Montrealo, 8-10 aŭgusto 2020

Esperantic Studies Foundation (ESF), kunlabore kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), planas organizi sian venontan Nitobe-Simpozion de la 8-a ĝis la 10-a de aŭgusto ĉe la Universitato de Montrealo. La laboraj lingvoj de tiu ĉi aranĝo estos la angla, franca kaj Esperanto.

La Simpozioj Nitobe, nomataj honore al la japana internaciisto kaj diplomato Nitobe Inazo, kiu estis Vica Ĝenerala Sekretario kun respondeco pri kulturaj aferoj en la fruaj jaroj de la Ligo de Nacioj, estas organizataj ĉiujn kelkajn jarojn en diversaj mondopartoj. Simpozioj okazis tra la jaroj en, ekzemple, Prago, Berlino, Vilno, Tokio, Pekino kaj Rejkjaviko.

La simpozio de 2020 markos la 75-an jubileon de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝia strebado konservi la pacon, fortigi homajn rajtojn, kaj antaŭenigi daŭripovan evoluigon, en multlingva mondo. Sub la ĝenerala titolo “Lingva Diverseco kaj Daŭripova Evoluigo” ĝi esploros tri ĉefajn temojn:

- **Lingvo kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo**
- **Multlingvaj informadaj kaj komunikaj teknologioj en daŭripova evoluigo**
- **Desuba multlingvismo kaj la defioj de daŭripova evoluigo**

Ni invitas ĉiujn fakulojn kiuj interesiĝas pri lingvopolitiko, UN-studoj, evoluigaj studoj, komunikaj teknologioj, kaj rilataj temoj, sendi al ni esprimojn de interesiĝo pri partopreno en la Simpozio kaj kontribuado al tiuj ĉi kaj rilataj temoj. Bonvolu mallonge priskribi kiel vi povus kontribui kaj kiujn ĉefajn interesojn vi havas. La simpozio limiĝos al proksimume kvindek invititoj el la tuta mondo. La programo enhavos ĉefparoladojn, podiajn diskutojn kaj rondajn tablojn. La simpozio ne havos aliĝkotizon, sed partoprenantoj respondecos pri la propraj kostoj de vojaĝado kaj restado.

Bonvolu sendi viajn proponojn al mtfettes@sfu.ca kaj tonkin@hartford.edu, prefere ĝis la 15-a de marto, 2020.

Mark Fettes, Simon Fraser University, Vancouver, Kanado
Humphrey Tonkin, University of Hartford, Connecticut, Usono

UEA festas la 60-an datrevenon de la Deklaracio de la Rajtoj de la Infano

Okaze de la 60-a datreveno de la Deklaracio de la Rajtoj de la Infano, UEA sendis la jenan mesaĝon al siaj aliĝintaj naciaj Esperanto-

asocioj, fakaj asocioj, kaj individuaj membroj tra la mondo, vokante al festado de la Monda Infana Tago, 20 novembro: “La 20-a de novembro estos grava tago: en tiu tago en 1959, do antaŭ precize sesdek jaroj, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj akceptis la Deklaracion de la Rajtoj de la Infano.”

“La koincido de la tago kaj monato ne estis hazardo,” deklaris la mesaĝo: “Jam en 1954 la Ĝenerala Asembleo nomis la 20-an de novembro Universala Tago de la Infano. Ĝi celis antaŭenigi internacian solidarecon, konsciigon inter infanoj tutmonde, kaj plifortigon de la bonfarto de infanoj. La Deklaracio de 1959 estis produkto de tiu konsciigo – kaj same la Konvencio de 1989.”

La mesaĝo notis, ke “la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo akceptitaj de UN en la jaro 2015 por fiksi la prioritatojn sur la kampo de evoluigo, donas apartan atenton al infanoj, ilia sano, ilia eduko, kaj ilia bonfarto ĝenerale. Kaj kompreneble unu el la esencaj intereso de UNESKO estas la edukado de niaj infanoj.”

“Gepatroj, instruistoj, flegistoj kaj kuracistoj, registaraj gvidantoj kaj aktivuloj en la civila socio, religiaj kaj komunumaj eminentuloj, entreprenistoj kaj informmediaj profesiuloj, kune kun gejunuloj kaj infanoj mem, povas ludi gravan rolon en taŭga konsciigo pri la Universala Tago de la Infano en la propraj socioj, komunumoj kaj nacioj,” la mesaĝo notis – kaj aldonis: “Esperantistoj, kiuj ligas homojn trans naciaj kaj generaciaj limoj, povas aparte atentigi pri la situacio de infanoj tra la mondo per interveno ĉe la supre menciitaj personoj. Ili ankaŭ povas fari tute personajn kaj modestajn agojn – danki instruiston, fari ion specialan por infano, doni monon por helpi infanojn, volontuli.”

“Vi elektu – sed faru ion! Kaj faru vian eblon konsciigi la homojn pri la stato de la infanoj de la mondo – kaj konstrui mondon indan je la esperoj de niaj plej junaj civitanoj. Pludonu la mesaĝon, per sociaj medioj, per viaj personaj geamikoj esperantistaj kaj neesperantistaj, per leteroj en la gazetaro. Kaj memoru diri ‘Dankon’ ĉi-tage al almenaŭ unu instruisto aŭ alia profesiulo kiu okupiĝas pri infanoj!”

Laŭ la pozitiva reago, la Esperanto-komunumo sekvis ia rekomendon – kaj tiel rekonis la gravecon de la laboro de UN por helpi infanojn ĉie.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio,

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017

[1] 212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041